

# E Ŭ R O P A B U L T E N O

## Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 12

10-an de marto 2001

Redaktas:

*Umberto Broccatelli*

*Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio*

*Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio*

*u.broccatelli@fiscalinet.it*

*-u.broccatelli@libero.it*

*tel./fakso +39-0687135019*

Kasisto de EEU:

*Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@wxs.nl*

UEA-konto de EEU: **eece-p**

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio (EEU-informilo)* kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@fiscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

**Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”**  
*Hamilton, The Federalist*

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 € jare al la UEA-konto **eece-p**

## **E E U - I N F O R M I L O**

### **BRUSELA OFICEJO**

En pasinta novembro okazis, kiel vi scias, kunveno en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo de UEA de eŭropaj esperanto-aktivuloj. Unu el ĉefaj temoj estis la propono starigi en Bruselo Oficejon de EEU.

Poste la temo estis longe kaj vaste debatata per e-poŝta korespondado inter la EEU-aktivuloj, kaj esploroj estis surloke faritaj, pri kostoj kaj eblecoj. La Oficejo povus funkcii kiel oficiala sidejo de EEU kaj samtempe kiel oficejo de la Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropo. La oficejo povus starti je ia difinita minimuma nivelo, por kreski poste laŭ la kapabloj kaj la necesoj.

Sed la bazo de ĉio estas financado. Do ni eliru el la diskutoj kaj komencu konstrui.

La estraro de EEU alvenis al la decido lanĉi la ĉi suban alvokon.

### **A L V O K O : N I K O N S T R U U !**

*Komence de la venonta jaro ekcirkulos en dek du landoj de la Eŭropa Unio samaj monbiletoj kaj samaj moneroj. Tio konkrete montras, kiom multe nia ĉiutaga vivo, de ni civitanoj de EU, estas ligita al komunaj institucioj.*

*Ankaŭ ni eŭropaj esperantistoj estos pli kunligitaj.*

*Kaj tio pli bone montras la neceson de komuna Esperanto-agado en Eŭropo.*

*EEU celas ĝuste tion, nome antaŭenigi komunan agadon.*

*Por ke la Esperanto-agado eŭroponivela estu pli efika, estas necese ke EEU estu videble reprezentata tie, kie la ĉefaj organoj de Eŭropa Unio troviĝas, nome en Bruselo.*

*La EEU-estraro decidis provi starigi EEU-oficejon en Bruselo, kiu ebligu pli rektajn kontaktojn kun la ĉefaj eŭropaj instancoj, t.e. la Komisiono kaj la Parlamento, kaj zorgu informadon de la tre multaj ĵurnalistoj ĉiulandaj kiuj laboras en la “Eŭropa ĉefurbo”.*

*Minimume tia oficejo, kiu devus esti ankaŭ la oficejo de la Laborgrupo pri la Eŭropa Lingvoproblemo, devus funkcii almenaŭ tri duontagojn semajne kun unu deĵoranto; pli ambicia celo estas atingi plentempan funkciadon kun salajrata persono plus unu aŭ pluraj helpantaj aktivuloj.*

*La ĉefa problemo estas la mono. Francoj diras ke “estas la mono tio, kio faras la militon”, kaj tio validas ankaŭ por nia paĉa batalado.*

*Por certigi longedaŭran agadon de la oficejo, oni bezonas havi kapitalon, kies rento kovru la kostojn de la oficejo.*

*Ĉu eŭropaj esperantistoj kapablos realigi tion? Jen valora defio!*

*La estraro de EEU lanĉas alvokon al ĉiuj eŭropaj esperantistoj, al ĉiuj kiuj konscias pri la graveco de la eŭropa agad-kampo por la sukceso de la internaci-lingva ideo, al la landaj asocioj, al la internaciaj esperanto-organizaĵoj, por ke ili kontribuu al starigo de "Fondaĵo Eŭropo", en konto ĉe UEA.*

*Provizore, dum la formala starigo-procedo de la Fondaĵo, vi rajtas sendi viajn kontribuojn al la konto eece-p de EEU ĉe UEA, indikante la celon, t.e. "Brusela Fondaĵo".*

*La fondaĵo estos estrata de la EEU-estraro kaj ĉiuj kontribuoj estos diskonigataj pere de tiu ĉi bulteno kaj de la Esperantaj informiloj.*

*Ĉiu kontribuanto ricevos tiun ĉi bultenon ankaŭ en papera formo, sen plia pago.*

*Do, sciigu al ni ĉu Eŭropo estas vere grava por vi.*

**Investu en Eŭropon!**

*Ni atendas ke ĉiu landa asocio iniciatu kolektadon inter siaj anoj kaj forte apogu ĝin.*

*Dankon.*

*La prezidanto de EEU  
Umberto Broccatelli*

## 2001, EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ

La Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Konsilio proklamis la jaron 2001 "Eŭropa Jaro de la Lingvoj", kun la celo antaŭenigi la lernadon de fremdaj lingvoj en Eŭropo.

La koncernataj lingvoj estas la 11 oficialaj lingvoj de la Unio kaj ankaŭ minoritataj, regionaj lingvoj. Planlingvoj, kaj do ankaŭ Esperanto, ne estas koncernataj.

Tamen en kelkaj landoj okaze de aranĝoj faritaj kadre de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj esperantistoj sukcesis partopreni kaj atentigi pri la solvo proponita de la E-movado. Ni donas nur kelkajn ekzemplojn de tiaj agadoj faritaj.

BELGIO - En Namur (Valonio) dum semajno da informado organizita de la Urbo, Claude Piron, invitita kiel "honora gastoj" de la Urbo, parolis pri Espeanto kaj komunikado, en la Kulturdomo komencante sian paroladon en la Namura dialekto, estigante entuziasmon de la publiko. Poste li partoprenis debaton, en la franca lingvo, pri komunikado.

KROATIO - En la anglalingva paĝo de Ministerio pri klerigado de Kroatio, en Interreto, troveblas sub la punkto 13 en Nacia Programo de Lingvojaro 2001 Universala Kongreso de Esperanto kaj akompanaj programoj, inkluzive ILEI: ĉe [www.eyl2001.hr](http://www.eyl2001.hr).

SVEDIO - Grava aranĝo okazis en Luns (Svedio) pri la Eŭropa Jaro de la Lingvoj. Ĉeestis Bengt Nordlöf, kiu povis parolis pri la temo interpretado kaj tradukado en EU, sub la titolo "Iuj lingvoj pli egalaj ol aliaj."

### **BROŝURO PLURLINGVE ELDONATA**

Gados Laszlo (Hungario, <[glaci@elender.hu](mailto:glaci@elender.hu)>) verkis kajeron pri temo ligita al la internacia komunikado kaj al la lingvaj rajtoj.

Jen kiel la aŭtoro mem prezentas la kajeron:

*Tiu ĉi broŝuro estas verkita okaze de la EŬROPA JARO de LINGVOJ. Ĝi celas eŭropanojn el la plej diversaj tavoloj de la eŭropa socio, tiujn homojn, kiuj estas sentemaj je la lingvoproblemo, je la sorto de la gepatra lingvo, respektive tiujn, kiuj iamaniere respondas pri la aranĝigo de la lingvodemando.*

*Okaze de la diversaj aranĝoj por paroli pri eŭropaj lingvoj oni versajne prezentas la ĉefajn ecojn de la koncerna(j) lingvo(j). Sed ĉu oni parolas ankaŭ pri la danĝeroj, kiuj minacas tiu(j)n lingvo(j)n? Eble sporade. Tiu ĉi broŝuro emfazas la plej gravan karakteron de ĈIU etna lingvo: t.e. LA GEPATRALINGVA ROLO. Krome ĝi montras ankaŭ la danĝeron, kiu minacas (preskaŭ) ĉiun lingvon (ankaŭ ties gepatran rolon) kaj kiu estas akompananto de la t.n. tutmondiĝa procezo.*

*Estas tute ne versajne, ke okaze de la aranĝoj oni menciui, ke sekve de la eŭropa integriĝo la eŭropa loĝantaro bezonus krom la gepatra lingvo ankaŭ komunan lingvon, tian, kiu minacas neniun lingvon. Tiu ĉi broŝuro argumentas por tia komuna lingvo.*

*Versajne estas anoj en ĉiu lingvokomunumo, kiuj agadas por la defendo de la gepatra lingvo. Sed tia agado okazas aparte laŭ lingvoj, pro tio ĝi ne povas esti sufiĉe efika. Tiu ĉi broŝuro montras, ke ekzistas ilo kaj maniero ankaŭ por la komuna defendo por agadi pli efike.*

*Ĉio ĉi montras, ke eŭropaj esperantistoj havas aktualan kaj bazitan direndaĵon al eŭropanoj okaze de la Eŭropa Jaro de Lingvoj. Tial estas necese, ke tiu ĉi direndaĵo atingu homojn kaj instancojn en Eŭropo en la plej eble multaj lingvoj.*

La subaj linioj informas vin pri la aktuala situacio de niaj klopodoj.

LA INFORMOJN BONVOLU KONIGI ANKAŬ AL TIUJ, KIUJ NE HAVAS EBLON INFORMIĜI HELPE DE LA RETO!

ESPERANTA versio

Titolo: BRILU ĈIU LINGVO SAMRAJTE!  
PORMULTLINGVECO KAJ EGALRAJTA KOMUNIKADO EN EŬROPO

Eldono: Ĉ. en majo eldonos Humán Európa Szövetség (Hungario)

Reta loko: [http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/bros\\_co.htm](http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/bros_co.htm)

FRANCA versio, nun preparata fare de Claude Longue-Epée

GALEGA versio, nun preparata fare de Alonso Nuñez

GERMANA versio

Titolo: ALLEN SPRACHEN EINE ZUKUNFT. FÜR KULTURELLE VIELFALT UND GLEICHBERECHTIGTE VERSTÄNDIGUNG IN EUROPA.

Tradukintoj: Karl Liebermann kaj Ulrich Matthias, kun antaŭparolo de Frank Stocker.

Eldono: Eldonos Germana Esperanto-Asocio (GEA)

Reta loko: [http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/bros\\_de.htm](http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/bros_de.htm)

HISPANA versio, nun preparata fare de Alonso Nuñez

HUNGARA versio

Titolo: VIRÁGOZZÉK MINDEN NYELV! SOKNYELVÜSÉGÉRT ÉS EGYENJOGU NYELVI ÉRINTKEZÉSÉRT EUROPÁBAN

Tradukinto: László Gados

Eldonos Hungaria Esperanto-Asocio (HEA)

Reta loko: (post kelkaj semajnoj enretigos Ulrich Matthias)

Disvastigo: ĝia sendado estas planita al parlamentanoj, redaktejoj de amaskomunikiloj ktp.

ITALA versio

Titolo: PARIDIGNITÀ PER OGNI LINGUA! PER IL MULTILINGUISMO E PER LA COMUNICAZIONE PARITARIA IN EUROPA.

Tradukinto: Umberto Broccatelli

Eldono: En marto, kiel “Speciala numero” de la revuo “L’esperanto” (n-ro 3/2001), organo de Itala E-Federacio

Reta loko: Aperonta en [www.esperanto.it](http://www.esperanto.it)

Disvastigo: Ĝi estos sendata ankaŭ al vasta neesperantista adresaro, inkluzive de ĉiuj italaj EP-anoj.

SERBA versio, nun preparata fare de Renato Petrović

Reta loko: estos legebla ĉe retpaĝo de Serbia Esperanto-Ligo

NOTU:

La nova adreso de la diskut-grupo “Eŭropa jaro de la lingvoj” estas:

*[Jaro-de-lingvoj@yahoogroups.com](mailto:Jaro-de-lingvoj@yahoogroups.com)*



# *EŬROPA DEBATO*

## KIO POST NICO?

La konkludoj de la interregistara Eŭropa Supro-kunveno de Nico montris, ke la metodo de evoluigo de la traktatoj pere de interŝtataj interkonsentoj jam donis ĉion, kion ĝi povis doni.

Trovi interkonsenton inter dek kvin suverenaj ŝtatoj fariĝas pli kaj pli malfacila, ju pli oni alproksimiĝas al decidoj pri aferoj tuŝantaj la kernon mem de la suvereneco de la ŝtatoj.

La ideo, ke oni povas igi eblaj la decidojn akceptante la principon de „decido je plimulto de la ŝtatoj“, ŝajnas esti bazita sur demokratia principo, sed fakte ĝi estas tute maldemokratia.

Se plimulto de naciaj registaroj de la Unio atingus interkonsenton pri iu decido, kiu tamen ne estus akceptita de la registaroj aŭ de la parlamentoj de aliaj landoj, kaj tiuj landoj tamen estus devigitaj akcepti ĝin, tiam ekestus situacio en kiu civitanoj de tiuj „malplimultaj“ ŝtatoj estus devigitaj obei decidon faritan ne de siaj propraj elektitaj reprezentantoj, sed de aliaj. Kaj tio kompreneble naskus malkontentojn kaj rezistojn.

La sola maniero por atingi decidojn demokratie validaj estas postuli kundecidon de la Eŭropa Parlamento, kiu reprezentas la civitanojn ne laŭ nacioj sed laŭ politikaj opinioj.

La naciaj ŝtatoj tamen estas tre rezistemaj kontraŭ la ideo transdoni al la Eŭropa Parlamento efektivajn decidopovojn.

Reformo de la Unio kapabla certigi ties funkciadon, laŭ demokratiaj principoj, ankaŭ post la venontaj plilarĝiĝoj, estas farebla ne per la vojo de “interregistara traktado”, sed per la vojo “konstituci-fara”, nome per transdono de la tasko redakti novajn traktatojn al organoj libere elektitaj de la civitanoj.

La teksto de la “Eŭropa Ĉarto de la Rajtoj” prezentita en Nico estis ellaborita pere de kunlaborado inter la Eŭropa Parlamento, la Naciaj Parlamentoj kaj la reprezentantoj de la “civila socio”, t. e. reprezentantoj de opinioj, de volontulaj agadoj, de sindikatoj, de profesioj ktp.

La sama metodo povus esti sekvata por pretigi veran “konstitucian traktaton”, kiu difinu taskojn, rimedojn kaj povojn de la Unio, kaj la limojn inter ties kompetentojn kaj tiujn de la naciaj ŝtatoj. Tiun konstitucian traktaton oni devos poste submeti al aprobo de la civitanoj aŭ per referendumoj aŭ per la metodoj validaj en la diversaj landoj laŭ la respektivaj konstitucioj. Sekve tiu konstitucia traktato fariĝos la baza leĝo por la tuta Unio.

La eblaj vojoj por Eŭropa Unio estas nun du: aŭ pluri laŭ la interregistara metodo kaj alveni al paralizo de la decidoj kaj al la fakta transformiĝo de la Unio en simplan “areon de libera ekonomia interŝanĝo”, aŭ doni voĉon al la eŭropa popolo kaj starigi demokratiajn organojn ĝin esprimantajn.

Verŝajne tiun ĉi duan vojon ne volas sekvi, je la momento, parton de la ŝtatoj-membroj de la Unio. Tial estas necese ke tiuj ŝtatoj kiuj volas antaŭeniri, iru antaŭen ne atendante la ceterajn. Tiuj eble sekvos poste!

Estas necese, ene de la Eŭropa Unio, aperigi “malmolan kernon” progreseman, kiu devus ampleksi almenaŭ la ses fondintajn landojn.

Por ke tio okazu, necesas ke la publikaj opinioj aktiviĝu, aŭdigu sian voĉon kaj premu sur siajn parlamentojn.

La Supro-kunveno okazonta jarfine en Belgio estos la taŭga loko por alporti fortan voĉon de la eŭropa popolo.

**Umberto Broccatelli**